ĈEA-retkomunikoj 8/2006

CxEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio sendata al cxiuj rete atingeblaj membroj de CxEA sed ankaux al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ilin, suficxas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:

1. UK en Jokohamo: atentu la limdaton por la aligxo!
2. Starto en la reto
3. La lasta elsendo de Radio Varsovio
4. Esperanto-kalendaro
5. Seminario "Kion signifas 'labori por Esperanto' en la nuna mondo?"
6. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas
7. Bondeziroj

1. UK en Jokohamo: atentu la limdaton por la aligxo!
La 92-a Universala Kongreso de Jokohamo okazos inter la 4-a kaj la 11-a de auxgusto 2007. Atentu, ke la periodo de la plej favora kondicxo al la kongreso validas nur gxis la fino de decembro. 17-tagan dekomence internacian karavanon al Japanio lige al UK de la 28-a de junio gxis la 13-a de auxgusto organizas KAVA-PECH kunlabore kun Chinatour, vojagxoficejo specialigita al la landoj de Orienta Azio. Logxante en bona centre lokita hotelo en Kjoto ni havos unu semajnon por esplori la plej interesajn lokojn de Japanio (uzante la famajn ekspresajn trajnojn), sekve ni partoprenos la UK, dum la ekskursa tago konatigxos kun Tokio kaj post la kongreso dum libera tago por interesatoj estos organizita supreniro al la pinto de la monto Fujxi. Pli da informoj pri la UK
http://www.uea.org/kongresoj/uk_2007.html ,
pri la aligxiloj al gxi kaj pri la karavano cxe
http://www.kava-pech.cz/uk-jokohamo aux cxe chrdle@kava-pech.cz

2. Starto en la reto
La oficiala organo de Cxehxa Esperanto-Asocio estas atingebla ankaux rete. Momente estas presata la numero 4/2006, tamen jam nun gxi estas atingebla (same kiel la antauxaj numeroj) cxe la retpagxo, tamen antaux la malfermo konsideru la grandecon 2.5 MB
http://www.medy.cz/Brno-Esperanto/start406.pdf

3. La lasta elsendo de Radio Varsovio
Kiel vi jam versxajne scias, la plej populara radiostacio, kiu havis cxiutagajn programojn en Esperanto, ne plu auxdigxos esperante. Malgraux strebo de multaj esperantistoj tra la mondo konvinki la ministerion de eksterlandaj aferoj de Pollando, ke temas pri perfekta vojo por dissemi informojn pri Pollando, jam estas bedauxrinde la fina decido: La lasta tago, kiam estos auxdebla el Varsovio programo en Esperanto, estas cxi-vendredo.
http://www.radio.com.pl/polonia/audio.asp?rId=11 Pli detata raporto pri tiu bato vi povas legi cxe http://www.liberafolio.org/2006/poloniaeks1512

4. Esperanto-kalendaro 2007

2007-04-13/15: Adonido (Hlaváček jarní) en Ratíškovice. Renkontigxo de amantoj de naturo kaj bongusta vino. Inf.: melicharkova@quick.cz

2007-04-16/22: Printempa seminario en Skokovy, Cxehxa Paradizo. Inf.: drahotovaesperanto@seznam.cz

2007-05-30/06/03: La 5-a kongreso de AEH-IKEH (Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj), en moderna senbariera konstruajxo Juniorcentro, Seč. Inf.: aeh-ikeh@volny.cz

2007-06-14/17: La 6-a Turisma Renkontigxo en Plasy proksime de Plzeň (TREP). Inf.: esperantoplzen@centrum.cz

2007-06/30/07-06: EKOTUR 2007, Ekoturisma renkontigxo por piedirantoj kaj biciklantoj. Radošov apud Karlovy Vary, unutaga vizito de Internacia Filmfestivalo tie. Info: chrdle@kava-pech.cz

2007-06/30/07-14. Esperanto-Tendaro en Lancxov apud Vranovská přehrada. kursoj de Esperanto kaj aliaj fremdaj lingvoj. Unua etapo. Inf.: podhradska@volny.cz

2007-07-15/28: Esperanto-Tendaro en Lancxov apud Vranovská přehrada. kursoj de Esperanto kaj aliaj fremdaj lingvoj. Dua etapo. Inf.: podhradska@volny.cz

2007-07-21/28: Komuna busvojagxo el Olomouc al la 18-a Ekumena Kongreso (60-a IKUE, 57-a KELI) kune kun la 8-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro. Pelplin (PL). Inf.: m.svacek@seznam.cz

2007-07-28/08-12: 17-taga flugkaravano al Japanio kun partopreno de la 92-a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo.
Inf.: http://www.kava-pech.cz/uk-jokohamo aux chrdle@kava-pech.cz

2007-07-29/08/03: Familia ripozado + Seminario en Lančov.
Inf: podhradska@volny.cz

2007-08-04: Solena renkontigxo de eksaj tendaranoj kaj amikoj okaze de la 55-a Esperanto-tendaro. Inf.: podhradska@volny.cz

2007-09-12/16: La 16-a konferenco de IKEK (Internacia Komunista Esperanto-Kolektivo) en Dobřichovice apud Prago. Inf.: dieter.rooke@tiscali.ch

2007-09-24/30: InPaSem 2007 (Internacia Paroliga Semajno), kurso por komencintoj kaj seminario por jamaj parolantoj en Dobřichovice apud Prago.
Inf.: http://www.kava-pech.cz/inpasem aux chrdle@kava-pech.cz

Kaj jam notu por la jaro 2008:
2008-11-07/09: KAEST 2008 (Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) en Dobřichovice. Inf.: chrdle@kava-pech.cz

En la kalendaro estas envicigitaj nur la eventoj, kiuj okazos en Cxehxio aux almenaux startas el Cxehxio. La eventojn en eksterlando vi trovos cxe

http://www.eventoj.hu/kalendar.htm

5. Seminario "Kion signifas 'labori por Esperanto' en la nuna mondo?"
En la tagoj 29.7.-3.8.2007 okazos en Lančov seminario pri laboro por Esperanto en la nuntempaj ondicxoj kaj pri transdono de torcxo al juna generacio. En 2007 pasos 120 jaroj de ekzisto de Esperanto. Dum tiu tempo estis farita grandega laboro, kiu ofte por novaj, precipe junaj esperantistoj ne estas atingebla, kvazaux gxi ne ekzistus. Kion konkrete ni faru, por allogi la junan generacion kaj por transdoni la ricxan heredajxon tiel, ke la junaj estu interesataj, povu dauxrigi kaj disvolvi la movadon? Kion signifas "labori por Esperanto" en la nuna mondo? Ni havos je dispono 5 tagojn po 4 horoj, do entute 20 horojn, en kiuj eblas priparoli la novajn eblojn kaj metodojn, dauxrigi neoficiale oni povos ankaux posttagmeze laux intereso. Informoj: malovec@volny.cz

6. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas (oficiala organo de CxEJ)
Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ), kunlabore kun E@I (Esperanto cxe Interreto) organizis inter la 4-a kaj 10-a de novembro 2006 en Brno sukcesan trejnseminarion pri "Lingvoj en interreto", kiun partoprenis 23 junuloj el 9 landoj. Okazis trejnado en du grupoj, tri prelegoj de eksteruloj, internacia vespero kaj la cxeestintoj ekskursis al la urbo kaj la Moravia karsto. Senpere poste 16 de ili partoprenis la konferencon KAEST en Dobřichovice, kie 5 junuloj kontribuis prelegante.

La komitatano de CxEJ en TEJO, Marek BLAHUŠ, reprezentis TEJO-n en neesperantista seminario pri EU en Hispanio. Fine de novembro li interpretis inter esperanto kaj la cxehxa dum internacia konferenco pri lingva politiko en Bratislavo, kies laborlingvoj inkluzivis esperanton. En Brno CxEJ prezentigxis dufoje al studentoj de la unua semestro de esperanto en la Masaryk-Universitato, kiuj cxi-jare nombras 60.

CxEJ mendis ekzemplerojn de la Manlibro pri Vikipedio eldonita de FLEJA, kaj de la nova eldono de la DVD Esperanto Elektronike de E@I. Tiuj peteblos post Silvestro - kiun 7 cxehxaj gejunuloj planas pasigi cxe junulara renkontigxo Ago-Semajno en Pollando. Aktualajxoj pri cxehxa junularo cxiam troveblas cxe http://www.esperanto.cz/cej

7. Bondeziroj
Karaj legantoj, tiuj estas la lastaj CxEA-retkomunikoj en la jaro 2006. Tial ni uzas la okazon deziri al vi agrablajn kaj gajajn Kristnaskajn festotagojn kaj firman sanon kaj multe da energio por via por- kaj peresperanta agado, sed ankaux por la plenumo de aliaj viaj planoj en la jaro 2007.

Viaj Petro Chrdle, redaktoro de la neregula informilo "CxEA-retkomunikoj" kun la redaktokomisiono: Jana Melichárková, Jiří Tomeček, Pavel Polnický, Věra Podhradská, Vratislav Hirš kaj Miroslav Vaněk, cxiuj-cxi komitatanoj de CxEA, Marek Blahuš, Dagmar Chvátalová, prezidanto kaj vicprezidantino de CxEJ kaj Miroslav Malovec (redaktoro de la oficiala organo de CxEA Starto).